

BELGA ESPERANTISTO

47a Jaro — N-ro 8a — Septembro-Oktobro 1955a

Fondita
en 1908a

Redaktoro-Administranto:

la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44

Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO



Abonprezo:

Fr. 100,-

Nia Jubilea Kongreso

S-ro Maur. Jaumotte, nia Ligo Prezidanto, kaj S-ro H. Sielens, ĝenerala sekretario, ĉeestis kunsidon en la hejmo de G-roj Vandevelde kaj al kiu partoprenis diversaj aktivaj gentaj gemembroj.

La celo estis ekzameni la situacion en tiu ĉi urbo, kie okazos dum la Pentekostaj tagoj de 1956 nia 40a, do Jubilea Kongreso, en la kadro de pli vasta Beneluksa Kongreso.

Tiacele L.K.K. devas esti kunmetata, en kiu la tri partoprenantaj Ligoj havos siajn delegitojn.

Jam de nun S-ro Gruslet kaj S-ro Temmerman akceptis iĝi L.K.K.-anoj kaj, post kelkaj tagoj, tria delegito estos indikata.

Tiel unua kunsido de la L.K.K. povos okazi post du aŭ tri semajnoj kaj ni povas esti certaj, ke la 4a Beneluksa Kongreso kaj 40a Belga Kongreso iĝos plene sukcesaj.

Kaj, dum ni parolas pri Kongreso, ni, jam de nun, povas diri ke niaj Antverpenaj amikoj serioze pensas pri la rea organizo de antaŭ-kongreso en 1956.

Ĉiuj, kiuj ĝin partoprenis en 1954, scias kia sukceso ĝi iĝis kaj neniun dubas ke Antaŭkongreso sur la vojo al Kopenhago, kie okazos la 41a Universala Kongreso, kunigos en Antverpeno, kongresanojn el preskaŭ ĉiuj sudaj landoj.

Kaj la Antverpenanoj eĉ pristudas, ĉu tiuokaze ne estos eble organizi samtempe iun ferian semajnon, laŭ la ekzemplo de tio, kio okazis jam plurfoje en eksterlando.

Sed pri tiuj ĉi du punktoj, — kiel cetere pri la unua, — ni baldaŭ ek-aŭdos pli detalajn informojn. M. J.

HANS JAKOB

festis sian oran Esperantistan jubileon

En ĉi tiu somero nia ŝatata ĝenerano Hans Jakob fariĝis kvindekjara kiel verdstelano. Pro la ne ĉiusemajna apero de nia gazeto ni malfrue gratulas, sed aliflanke tiu prokrasto ebligas al ni represi el la organo de la Universala Ligo „La Praktiko” la jubilean artikolon, kiun profesoro Privat tie publikigis; kaj li multe pli bone ol ni tion povus fari, honoras la personon kaj agadon de Hans Jakob. Ni do transdonas al li la parolon:

Antaŭ kvindek jaroj knabo studenta en Heidelberg trovis lernolibron de Esperanto kaj entuziasmiĝis por la afero. Estis Hans Jakob, kaj baldaŭ li korespondis kun Hector Hodler, la fondinto de Universala Esperanto-Asocio. Post kelkaj jaroj la junulo estis invitata al Genevo kaj eklaboris en la Centra Oficejo de U.E.A., kie organiziĝis kaj sistemigis la kreskanta reto de la delegitoj. Li redaktis la jarlibrojn kaj admiris la pioniran genion de Hodler, kies fide-la kunlaboranto li fariĝis.

Post la morto de Hodler en 1920 Hans Jakob sekvis la gvidon de lia amiko Eduard Stettler en Bern, kaj, kiam retiriĝis kaj mortis ankaŭ tiu pioniro, li direktis mem la grandan asocion, kiu ebligis la tujan uzadon

de la lingvo kaj ĝian viviĝon per utilaj servoj plenumataj de sindonaj homoj.

La jarlibroj fariĝis pli kaj pli riĉaj. UEA komencis eldoni librojn, kaj la gazeto „Esperanto” daŭre unuigis la diversajn fakojn de la movado. Laborante de frumateno ĝis nokto en la ĝeneva centro, Hans Jakob sindone aplikis la principojn de Hodler al la organizado de la servoj kaj aldonis siajn proprajn ideojn, kiel agema kaj planema direktoro.

Li estis senĉese helpema persono, kaj dum la dua mondmilito multegaj homoj ricevis de li fratan faciligon en iu aŭ alia maniero. Li havas ekster-

ordinaran talenton por eltrovi aranĝojn kaj sciis, kiel certigi la vivon de U.E.A. en la plej krizaj momentoj.

Al lia pacienca kolektemo ni ŝuldas la riĉan bibliotekon de U.E.A., kaj ĉiu esperantisto deziras, ke tiu mirinda arkivaro baldaŭ trovu taŭgan ejon por ebligi la estontan laboron de la serĉantoj, kiuj volos studi la dokumentaron. Ili trovos tie ĉion pri la Esperanto-movado kaj ankaŭ pri la mondlingva historio ĝenerala.

Kiam nia movado reorganizigis post la dua mondmilito, la centro translokiĝis al Londono kaj Hans Jakob daŭre redaktis la organon „Esperanto”, dum li trovis altan oficon en la ŝvisa ŝtat-asekuro kaj ludis aktivan rolon en la ĝeneva politika vivo.

Kiu ne konas lian legendan figuron en niaj universalaj kongresoj, sidantan ĉe tablo kun amikoj sur teraso de kafejo, dum li mirigas ĉiujn aŭdantojn per sia kapturiga memoro pri nomoj kaj vizaĝoj? Liaj bonhumoraj kaj amuzaj rakontoj ĉiam kreas rondon ĉirkaŭ li kaj la sennombraj servoj, kiujn li faris al multegaj samideanoj, havigis al li vastan mondon de dankuloj en ĉiuj landoj.

Antaŭ nelonge, dum bedaŭrinda polemiko, ni malkonsentis kun li pri ciklulero, kiun li subskribis, sed, feliĉe, la afero paĉiĝis. Eĉ tiam kaj ĉiam ni fidis je lia plena sincereco kaj je lia deziro al la bono de nia movado.

Dum kvindek jaroj li laboris por ĝi, silente kaj fidele, for de la bruo de aplaŭdoj, kaj ofte por la plej lacigaj kaj sendankaj taskoj. Li havis multajn ĉagrenojn kaj lia sano pagas pro la troa streĉo. Nun sonas la horo de lia jubileo: duoncentjara esperantisteco! En la nomo de miloj da ĉiulandaj amikoj ni deziras diri al li koran gratulon kaj dankon pro ĉio bona kaj utila, kion li faris. La memoro de Hector Hodler aldonigu je tiu dank-esprimo al lia plej fidela sekvanto!

Edmond Privat.

LA 40-a Jubilea UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La 40-a okazis ĉi-jare en Bologna, bela urbo en la rava Italujo. La nura vizito al ĉi-tiu urbo estas jam allogaĵo, speciale por tiuj, kiuj venas el okcidenta aŭ norda Eŭropo. Anoncis sin proks. 1700 kongresanoj, el kiuj proks. 1300 vere ĉeestis. Erare multaj supozis ke la varmo ne estas eltenebla. Kontraŭe; kvankam kompreneble la temperaturo estis alta, oni preskaŭ ne sentis ian ĝenon kaj havis bonan okazon por rigardi la vivantecon de la enloĝantoj. Aldone al tio oni sciis, ke ĉiuj stratoj havas siajn galeriojn ambaŭflanke, kie re-

Urbanoj!

Bologna gastigas de la 31a de julio ĝis la 6a de aŭgusto la 40an Universalan Kongreson de Esperanto. De Boulogne-sur-Mer, kie en la malproksima 1905 okazis la unua Kongreso, kulminas hodiaŭ en nia urbo la jubileo de ĉi tiu ideo, kiu — konkretiginta en la parolo — havis en L. L. Zamenhof sian plej ĝenian pledanton. Bolognanoj!

Al tre bonvenaj gastoj kiuj ĉi tie kunvenas el ĉiuj partoj de la mondo iru la kora saluto de nia urbo kune kun la sincera bondeziro ke la ideoj

la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de la granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas."

Sed antaŭ la prezidanto de U.E.A. paroladis la urbestro de Bologna, en bona Esperanto, kaj esprimis sian fieron ke Bologna povas akcepti la tutmondajn batalantojn por la paco en internacia momento bonŝance bondezira por ĉiuj pacaj homoj. Sekvis parolado de la urbestro de Boulogne-sur-Mer, en franca lingvo, kiu estis speciala gasto de la kongreso. Dume sur la granda podio videbligis la standardoj de Bologna kaj Boulogne-sur-Mer, tiel esprimantaj la kontinuecon de la Universalaj Kongresoj. Krome en butikoj tuj apud la kongresejo estis montrataj la unua Esperanto-flago de Boulogne-sur-Mer kaj multaj aliaj dokumentoj de ĉi tiu unua kongreso.

Kiel kutime aŭdigis la voĉoj de la reprezentantoj de 15 registaroj (inter ili, tiuj de Belgujo kaj Nederlando) kaj de diversaj landaj asocioj (Fino Terrijo parolis el la nomo de belga kaj flandra ligoj, fino Vermaas por Nederlando).

Kortuŝe oni vidis en la salonego kelkajn veteranojn, kiuj ĉeestis en la unua Kongreso, la nestoro de Svedujo, s-ro Paul Nylén (kiu poste parolis pri la unuaj jaroj de Esperanto), s-ro D. H. Searle el Anglujo kaj Prof. D-ro E. Privat. La lasta elparolis, laŭ sia kutima kaj oratora maniero, la festparoladon, kiun li finis proks. per jenaj vortoj: „Eĉ se malaperos ĉiuj esperantlingvaj libroj nun ekzistantaj en la mondo, la lingvo internacia tute egale plu vivos sian vivon sur la lipoj kaj en la koro de la esperantista popolo."

Tuj post la inaŭguro de la U.K. la urbestroj kune kun granda nombro da kongresanoj malkovris en nova kvartalo de la urbo stratan ŝildon, menciante la nomon de L. L. Zamenhof, kreinto de Esperanto.

Kiel kutime abundis dum la kongresa semajno la multaj programejoj, inter kiuj elstaris la prelegoj de la Internacia Somera Universitato. Ili estis tre diversaj kaj estas konstatable ke de jaro al jaro la nivelo de tiuj prelegoj plialtiĝas. Fakte tiu ĉi Universitato estas unikajo en mondo, en kiu oni ankoraŭ baraktas, speciale en sciencaj rondoj, kontraŭ la lingvo-diverseco. Cetere okazis la kutimaj kunvenoj de U.E.A., kiuj staris nunjare speciale en la signoj de

de frateco kaj de unuiĝo inter la popoloj, kiujn Esperanto entenas en la simbolo de la kvinpinta verda steio, trovi ĉiam pli firman kaj laŭcelan efektivigon por la plifirmiĝo de la paco kaj de la amikeco inter la homoj de la tuta mondo.

La Komunuma Magistrato.

Efektive tiuj varmkoraj paroloj de la urbestro impresis la kongresanojn, same kiel la ĉeesto de la urbestro de Boulogne-sur-Mer, la historia urbo de la unua Kongreso. En tiu senco estas tute memkompreneble, ke s-ro E. Malmgren, en la solena inaŭguro komencis sian paroladon per la samaj vortoj, kiujn elparolis d-ro Zamenhof en Boulogne-sur-Mer: „Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj, el la granda tutmonda familio kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el



Placo Maggiore kaj Accursio Palazzo

gas ombro kaj kiuj ŝirmas kontraŭ ventuala pluvo. Bologna povas fieri pri diversaj antikvaj konstruaĵoj, kiuj, kvankam ili laŭekstere montras malmultan belecon, interne posedas mirindajn artaĵojn. Unu el tiuj estas la urbdomo, kie la urbestro, s-ro Dozzi, malavare akceptis kaj regalas la tutan kongresanaron, kaj kies interno estas trezorejo de la plej granda valoro. Abundas la pentraĵoj de famaj italaj artistoj; la vastaj haloj kaj salonoj impresas; eĉ ĝi enhavas specon de ŝtuparo, sur kiu kaleŝo povas atingi la unuan etaĝon. Dum la tuta kongreso gaje flirtis la flugetoj sur tramoj kaj aŭtobusoj; la urbestro donacis al la kongresanoj senpagan tutsemajnan karton por tiuj trafikiloj. Cetere oni ĉie renkontis publikan afiŝon de la komunumo, en la itala kaj esperanta lingvoj, tekstantan:

la konataj Unesko-decidoj kaj de la Eŭropo-federalismo. Krome oni povis ĉeesti ĉe la multaj kunsidoj de la fakaj organizoj. Nunjare oni sukcesis prezenti al la kongresanaro teatraĵojn, „La Revizoro" de Gogol, laŭ la traduko de Zamenhof. Persono mi ne povas diri ke ĝi estis granda sukceso, kvankam oni devas admiri la amatoran teatran grupon ne-esperantistan, kiu en sep monatoj kaj lernis Esperanton kaj la enhavon de la nefacila teatraĵo. Evidente la belega urba teatro estis tro vasta por tiuj amatoroj; la virinajn voĉojn oni malfacile povis aŭdi. Jam post la paŭzo kelkaj kongresanoj forlasis la teatron pro tiu kaŭzo. Mi scias ke en oficialaj rondoj de nia movado oni tre ŝatas la propagandon valoron de tiaj prezentaĵoj, sed estas tre dubinde, ĉu komencanta esperantisto povas ĝui ilin. En tiu senco la arta vespero estis multe pli sukcesa. Kantis vira ĥoro kaj diversaj gekantistoj, kaj tiuj, kiuj konas la italajn voĉojn, komprenos ke tiu aranĝo estis vere grandioza. Kaj alia belega prezentaĵo (cetere ekster la kadro de la kongreso) estis la jubilea rapsodio. Ĝi okazis en subĉiela teatro sub ĝenerala gvidado de s-ro R. Dupuis kaj kunlaboris

multaj eksterlandaj esperantistoj. Zigzage oni vidigis, kaj en paroloj kaj en scenoj, la plej gravajn okazintaĵojn en la Esperanto-movado. Belega kantado kaj piano-muziko akompanis la prezentaĵojn, kiu rikoltis grandan aplaŭdon.

Iom kritike mi devas raporti pri la Interkona vespero kaj la balo. Ambaŭ okazis en tro malvastaj salonoj, tiel ke multaj gekongresanoj ne trovis lokon. Estas necese ke oni trovu iun solvon speciale por la Interkonaj aranĝoj. En Bologna iu orkestro faris tiom da bruoj, ke interparolado praktike ne eblis.

Baldaŭ, fakte tro rapide proksimiĝis la lasta tago, la sabato de la fermo kaj adiaŭo. En la ferma kunsido oni raportis pri la kunsidoj de la Komitato kaj unuanime akceptis kongresan rezolucion. En bonega ferma parolado la prezidanto de U.E.A. instigis la kongresanojn al daŭra varbado. „Kaj ne forgesu aranĝi novajn kursojn, eĉ la plej modestajn. Sed atentu, ke via kursa laboro ne finiĝos je la fino de la kurso. Rigardu: ĉiu partopreninto de komenca kurso estas kiel delikata planto. La vento povas ĝin forŝiri, la pluvo povas ĝin forputri, la suno povas ĝin forvelki.

Flegu la plantojn, la novajn esperantistojn, kun amo kaj atento". Kaj per la vortoj „Kongresanoj, esperantistoj, plenumu vian mision", s-ro Malmgren finis sian paroladon.

Estas evidente, ke la kongresaj aranĝoj ne estis ĉiam perfektaj. Tamen, tiuj kiuj estis en Bologna, ankoraŭ longe memoros la jubilean kongreson. Dankon, multan dankon ni ŝuldas al s-ro Zacconi kaj liaj LKK-kunuloj, kiuj per manpleno da kunlaborantoj sciis aranĝi imponan kongreson. Tiun dankon same meritas s-ro M. Stuttard, kiu dum la tuta kongreso ŝtrece kunlaboris.

M.

La plej gravaj decidoj de la Komitato de U.E.A.

Dum siaj kunsidoj la komitato decidis;

akcepti la aliĝon de la landaj asocioj en Polujo (kondiĉe ke ĝi povos pagi la kotizon) kaj de Bosnio kaj Hercegovino, krome duan landan asocion en Nord-Ameriko;

evolui la movadon kaj UEA laŭ speciala baza programo, kiu antaŭvidas la agadojn en la sekvantaj jaroj, speciale pro la decidoj de Unesko; plialtigi la kotizon por MS ĝis 30 anglaj ŝilingoj;

stribi al plibonigo kaj eventuale pligrandigo de la revuo;

starigi lingvan sekcion de UEA por kontroli lernolibrojn kaj organizi altgradajn ekzamenojn;

nomi s-ro'n Fernandez Menendez kaj s-ro'n Hans Jakob honoraj membroj de U.E.A.

Pro la eksiĝo de s-roj D-ro Kempeneers, s-ro Oliver kaj s-ro Jakob, la estraron por la jaro 1955 formas s-ro E. Malmgren (prezidanto; ĝeneralaĵoj aferoj kaj Univ. Kongresoj) s-ro D. Kennedy (vic-prezidanto; landaj kaj fakaj asocioj)

s-ro D-ro I. Lapenna, ĝenerala sekretario kaj C.E.D.

s-ro R. Llech-Walter (kongresoj, konferencoj kaj propagando)

s-ro P. M. Mabesoone (financoj kaj administrado).

S-ro W. Auld transprenos la redaktadon de la revuo.

Car s-ro J. C. Rapley pro personaj kaŭzoj eksiĝos kiel provizora ĝenerala sekretario de la C.O. en Heronsgate, s-ro M. Stuttard dum kelkaj monatoj transprenos lian laboron. En Nederlando oni fondos administran filion de la C.O., kies gvidantino estos fino M. Vermaas. S-ro M. Stuttard cetere demetos la funkcion de KKS; anstataŭos lin s-ro G. C. Fighiera (Italujo).

KONGRESA REZOLUCIO

La 40-a Universal Kongreso de Esperanto, okazinta en Bologna de la 30-a de Julio ĝis la 7-a de Aŭgusto 1955, en ĉeesto de 1700 reprezentantoj el 36 landoj, unuanime:

1) kun ĝojo konstatas, ke la Geneva Konferenco de la kvar ĉefoj de Registaroj iniciatis malstreĉigon de la internacia tensio kaj esperas ke tiu komenco estas sekvata de pozitivaj rezultoj precipe sur la kampo de pli bona kompreniĝo kaj proksimiĝo inter la larĝaj popoltavoloj de ĉiuj nacioj de la mondo;

2) esprimas sian kontenton pro la Rezolucio de la 10-a de Decembro 1954, per kiu la Ĝenerala Konferenco de U.N.E.S.C.O. objekte rekonis, ke la Internacia Lingvo Esperanto kontribuis al internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj al monda paco, kaj ke ĝiaj atingajoj respondas al celoj kaj idealoj de U.N.E.S.C.O.;

3) atentigas, ke ĉiu sincera klopodo proksimigi la popolojn, krei spiriton de reciproka toleremo kaj formi veran internacian solidarecon ne povas neglekti tian potencon instrumenton de internacia komunikado kia estas la Internacia Lingvo Esperanto kaj tial;

a) apelacias al naciaj kompetentaj instancoj doni sian apogon al disvastigo de Esperanto, tute speciale per helpo al starigo aŭ restarigo de la Esperanto-organizaĵoj en tiuj landoj, kie tiaj pro diversaj kaŭzoj nuntempe ne ekzistas;

b) petas la Registarojn de ĉiuj ŝtatoj profunde studi la eblecojn enkonduki Esperanton en la lernejojn prefere surbaze de Internacia Konvencio, kiu fiksos la detalojn rilate la studon en diversaj landoj samtempe;

c) notas kun aprobo, ke la urbestroj de Bologna kaj Boulogne-sur-Mer dum la Kongreso solene ĝemeligis siajn urbojn per Esperanto kaj esperas, ke multaj aliaj urboj sekvos tiun ĉi ekzemplon;

d) turnas sin al ĉiuj, kiuj aspiras pli grandan unuecon de la mondo kun la alvoko ellerni la Internacian Lingvon kaj vaste praktiki ĝin en la internaciaj rilatoj.

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Brnynlaan, 44, Wiirijk.
 Viceprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
 Viceprezidantino: S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.
 Generala Sekretario: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo“, Falcon-
 rui, 21, Antverpeno.
 (Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“
(Poŝtĉeknumero: 726.54)

La 29an de julio la amuza vespero gvidata de F-ino C. Peeters, alias Bietje, bone sukcesis. Post malgranda rakonto de S-ro R. Balleux pri lia vojaĝo en Nederlando, Bietje kreis dum tuta horo gajan atmosferon kiu forgesigis la ĉiutagajn zorgojn kaj la malfacilaĵojn de la vivo. Si tion faris ne nur per la prezentado de la diversaj numeroj, sed ankaŭ laŭ sia propra „netaŭgulineta“ maniero kiun la publiko tre verŝajne ege ŝatis, juĝante la aplaŭdon je la fino post la dankvortoj de la Prezidanto. F-ino Farré el Hispanujo vizitis la grupon okaze de sia restado en Antverpeno kien ŝi akompanis sian fraton (ankaŭ esperantisto) kiu partoprenas al la tutmonda ŝakturniro por junuloj-amatoroj.

La 5an de aŭgusto, la parolata ĵurnalo altiris multajn membrojn malgraŭ la plena libertempa periodo. Diversaj ĉeestantoj kunlaboris, inter ili F-ino L. De Winter detale raportis pri sia vizito al Nederlando kaj precipe pri sia partopreno al la Internacia Konferenco de Esperantistoj en Rotterdam. S-ro Farré, la hispana ŝakludanto, kun sia fratino vizitis la grupon kaj rakontis pri siaj travivaĵoj en la ŝakturniro.

La 12an, por anstataŭi la antaŭviditan raporton pri la Internacia Kongreso en Bolonjo (la raportantino ne ankoraŭ estis hejme), S-ro Maur. Jaumotte, helpe de la ĵumbildaparato (kiun flegis S-ro R. Jaumotte) montris serion da fotografajoj pri la monda ekspozicio de 1935a en Bruselo kaj pri parto el la vivo de la reĝino Astrid, kies kruela morto plifruigis la fermon de tiu ekspozicio. Laŭ agrabla, ĉiam aŭskultinda

tinda maniero la paroladisto klarigis kaj komentariis diversajn detalojn pri okazintaĵoj jam tiel fore en la estinteco. Portugalaj samideano, kiu vizitis Antverpenon kaj ĉeestis la kunvenon, esprimis sian admiron por la vigla paroladisto kaj la interesa programo: li certe estis la interpretanto de ĉiu ĉeestanto.

Programo de la venontaj kunsidoj:
 Ĉiuvendrede en „Witte Lecuw“, Frankrijk 4. je la 20.30a h. (1a etaĝo):
Septembro: la 23an: Debatvespero: „Teatro aŭ filmo“ enkondukota de S-ro J. Verstraeten; la 30an: Kabareta vespero.
Oktober: la 2an: (dimanĉe) Vizito al la Katedralo gvidota de S-ro Paesmans. Kunveno sur la Verda Placo je la 14.15a h.; la 7an: Parolata ĵurnalo; la 14an: Lastaj raportoj pri la libertempo; la 21an: Magnetofona disaŭdigo; la 28an: Amuza Vespero.

Familia Vivo

Korajn gratulojn ni sendas al G-roj H. Vermuyten, kiuj iĝis geavoj per la naskigo de nepeto Jan kaj ni aldonas niajn plej sincerajn bondezirojn al S-ino Bl. Vermuyten, kiu estis operaciata. Ke ŝi baldaŭ plene resaniĝu kaj estu ree en nia mezo.

BRUGO

Bruga Grupo Esperantista
(Poŝtĉeknumero: 4835.33)

La kunveno de la 19a de julio estis prezidata de F-ino A. Boereboom, viceprezidantino, kiu anstataŭis S-on Ch. Poupeye, en libertempa vojaĝo. Sub ŝia gvidado okazis interparolaj ekzercoj, post kio, pro la belega vetero, la ĉeestantoj aranĝis agrablan postkunvenon sur plenaera kafejoteraso.

Dimanĉon, 24an de julio, S-ro Lucien Giloteaux, la aĝema sekretario de Lille-Esperanto, kun S-ino. Giloteaux kaj kelkaj francaj samideanoj vizitis nian urbon. Delegacio de la Bruga E.K.I. akceptis kaj gvidis ilin. Poste aperis en la franca tag-ĵurnalo Nord-Eclair tre taŭga artikolo pri tiu vizito.

Post la leciono de la 26-a de julio, S-ro L. Van Wassenhove raportis pri vojaĝo al la Nigra Arbaro.

Triopa interparolado kaj disaŭdigo de diskosj agrabligis la duan parton de la kun-

Por sia vintra provizo
 Por sia antracita karbo
 la Esperantistoj mendas
 ĉe **BELGOMINE**
 FRANKRIJKEI, 20
 ANTVERPENO
 kiu donas specialan premion

veno de la 2a de aŭgusto.

Tiu de la 9a estis dediĉata al diskonigo de kelkaj tro malmultaj novaĵoj pri la Universala Kongreso kaj al legado de „Belga Esperantisto“.

Dum la dua parto de la kunveno de la 16-a de aŭgusto aperis plia numero de la „Parolata Gazeto“. F-ino Is. Van Parys parolis pri „Vino“. S-ro W. Speybroodt prezentis kelkajn dirajojn el „La Libro de la Saĝo“ kaj S-ro Ch. Poupeye antaŭlegis artikolon pri „Niaj familiaj nomoj.“

La 23an de aŭgusto, S-ro Ch. Poupeye, iom malsana, ne povis prezidi. F-ino Is. Van Parys, kasistino, anstataŭis lin, sed la varmeco en la ejo ne estis tolerebla kaj la kunveno estis agrable kaj pli freŝe daŭrigata en boateto sur la lumigitaj kanaletoj, post kio sekvis ankoraŭ postkunveno sur kafejoteraso. Estis vere tro varmege por enlitiĝi ... kiel la prezidanto!

Programo de la sekvontaj kunvenoj:

Ordinara kunveno ĉiumarde je la 20a en la sidejo „Gouden Hoorn — Cornet d'Or“ Simon Stevinplaats 2.

Septembro: memorige.

20-an: a) Leciono; b) Muzika vespero.
 27-an: a) leciono; b) Portretludado.

Oktober: 4-an: a) leciono; b) Parolata gazeto.

11-an: leciono; b) Parolado: Impresoj pri Bretonujo, de S-ino S. Verbeke-Van den Bergh.

18-an: a) leciono; b) Muzika vespero.

BRUGGE

BRUGES

Hôtel du Cornet d'Or

2, Simon Stevinplaats, 2

Centra situo - Moderaj prezoj

Moderna komforto

Sidejo de Bruga Grupo Esperantista.

Tel. 314.59

Krizo en U.E.A.

Responde al diversaj leteroj ricevitaĵ, ni diru ke post la eksigo de D-ro P. Kempeners, emerita prezidanto de R.B.L.E., kaj de S-ro Oliver, prezidanto de la Brita Asocio, ankoraŭ kvin pliaj eminentuloj eksigis el la gvidado de U.E.A. post kiam, en Bulonjo, la duo Lapenna-Vermaas estis indikataj por repreni tiun gvidadon.

Ni aldonu ke tre certe D-ro Lapenna, F-ino Vermaas kaj la tro komplezema prezidanto de U.E.A. S-ro Malmgren, ĉefe kulpas pri tiuj eksigoj, pri kiuj S-ro Jung en „Heroldo de Esperanto“ skribis ke pro tiuj ĉi hekatomboj „la Centra Oficejo ne plu estas funkcikapabla en la propra domo de Heronsgate kaj devas transloĝiĝi al Nederlando“.

Post kelkaj tagoj, la administrantaro de R.B.L.E. priparolos la tiel kreitan situacion.

25-an: a) leciono; b) Parolado: Libertempo en Nice, de F-ino Yvonne Poupeye.

GRATULOJ:

Al S-ro Advokato kaj al S-ino R. DE PAUW-SUY, gemembroj de la Bruga Grupo, pro la naskigo de ilia dua filo: Patrick (29/8/55).

Al S-ro David DEMEULENAERE, viceprezidanto de Bruga Grupo, administranto de RBLE., kiu laŭ Reĝa Dekreto de la 1/9/55 estis nomata kiel helpa juĝoregistristo de la pacjuĝejo de la 2a kantono de Bruĝo.

Kondolencoj:

Al F-inoj Isabelle kaj Yolande Van Parys, komitatanoj, kaj al F-ino Christine Van Parys, membrino de la Bruga Grupo, pro la morto de ilia praonklino F-ino Adolphe Van Parijs (6/9/55).

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo
(Poŝtĉeknumero: 1230.48)

La 1an de aŭgusto ni ĝuis Parolatan ĵurnalon, La palmoj iris al S-roj Schumacher kaj Jirousek.

La 8an ni faris grupe krucvortojn kaj bone amuziĝis.

La 22an S-ino Weyn organizis tre sukcesan „novmodan“: Amuzan vesperon. Ni ludis: „Vi kunportos kun vi se vi ekdivenas!“

La 29an: Pro manko de parolanto, la

Originalaj Poemoj

de

Claude Piron

SEZONOJ

Jen floro
 oras:
 printempa
 tempo.

La suno
 junas:
 trankvila
 brilo.

La vento
 pentas:
 trablova
 movo.

La neĝo
 reĝas:
 tutblanka
 flanko.

ĈE MARO

Agrable
 sur sablo
 mi kuŝas,
 kontente
 la vento
 min tuŝas.

Najbara
 la maro
 sin rulas,
 kaj luma
 sub suno
 min lulas.

Nur bruas
 la skuo
 de l' ondo,
 forestas
 la resto
 de l' mondo.

STUDENTAJ JAROJ

La amiko kiu babilas
 Kaj la tetaso sur tabl',
 La ĉambreto kiu trankvilas
 En la kunesta agrabl',

La gitaro kiu muzikas
 En delikata la ton',
 La vizaĝo kiu mimikas
 Laŭ la kantata kanzon',

La okuloj kiuj brilĝojas
 Gaje en lampa la lum',
 La silento kiu kelkfojas
 Pace en pipa la fum',

Al ĉi ĉio kio hodiaŭ
 Tiom varmecas en kor',
 Ĉu ni devas diri „adiaŭ“?
 Vere ĉu devas ĝi for?

DONACO

Mi iris foren en ĉielon
 Kaj tie serĉis multajn jarojn
 La plej belege brilan stelon
 Por meti ĝin sur viajn harojn.
 ...Sed tiom palis ĝia brilo
 Kompare kun ĉi harobel',
 Ke honta pri don' sen utilo,
 Mi ĝin rejetis al ĉiel'.

„Muziko estas lingv' de koro“
 Jen tiu penso en mia venis,
 Kaj, ŝtele, de anĝela horo
 Mi la plej belan kanton prenis.
 ...Sed dum vi unu vorton diris
 Muzikis tiel via voĉ',
 Ke ne doninte mi foriris.
 Kun plena kor' da memriproĉ'.

Kaj por donaco belkolora
 Pri kiu mirus la homar',
 Per fortostreĉo penlabora
 Mi ŝtelis bluan de la mar'.
 Kaj kun frazeto de gratulo
 Mi min preparis por la don',
 ...Sed bluis tro via okulo,
 Ne eblis tiu ĉi propon'.

Perdinte tiam la prudenton
 Kaj en profunda malesper',
 Jen ŝtelis mi l' inteligenton
 De l' plejsaĝulo de la ter'.
 ...Sed tiom tuje ĝi perdis
 En via cerbo tro malplena,
 Ke senkuraĝa mi fariĝis:
 Ne zorgos plu pri dono pena.

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16
 ANTVERPENO

— Por via MUZIKO
 RADIO kaj GRAMOFONO

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

BIBLIOGRAFIO

FERENC SZILAGYI. — *Koko krias jam!* Originala novelaro. Kovrilo de John Hartley. - Portreto de la aŭtoro. — STAFETO — n-ro 4 — eld. J. REGULO. La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1955, 232 p. Prezo: 12 angl.ŝil. aŭ 1.80 us.dol. Havebla ĉe via Libro-Servo.

Ni apenaŭ engarbejgis la freŝan novelaron „*El la Maniko*” de la skoto R. Rossetti, kiam ni rikoltas tiun de la konata hungar-svedo, per la jam kvara eldono de „*Stafeto*”. Ĉi-foje ĝi aperas tutruĝe *) en pli simpla sed tamen deca tuaŭeto, eĉ iomete malpli zorgita kvazaŭ por ilustritaj rakontoj pri la „presdiabŭeto” en „*facila veno*”, kiel averte titoligas la dua libro-parto, kies ses rakontoj, kvankam distre interesaj, efektive ne elkreskis la kadron de la anekdoto. Sed el tio ne estas konkludenda laŭarta malpli-valorulo de sep aliaj noveloj, kiuj pli firmigas, parte repravigas la renomono de la verkisto.

Szilagyi, eble trofrue metinta la ĉefakcenton sur la prozon **) estas lerta novelisto ja kun poeta animo, kaj ĉiam havas ion dirindan kaj volonte diratan pro interna puŝo. La nuna kulturo ĉefe moviĝas sub signo de racio kaj tekniko, sed beleco kaj fantazio feliĉe restas nevelkigeblaj branĉoj de lia vivarbo. Se la hela imago de l’pli sprita Rossetti senzorge suprensaltas de reala vivobazo, la prefere malhelkolora fantazio de Szilagyi, kiu cetere debutis per „*Trans la Fabeloceano*” (1932), radikigante en lia inventkapablo, pli alten flugas. Diversaj el liaj rakontoj, kun aŭ sen ironia bonhumoro aŭ aŭtobiografia elemento, ja disvolviĝas el origina „trovaĵo” kaj iomete misformantaj la „realon” en romantikeca sento, des pli tuŝas internan kordon.

Ne mirigas, ke li kiel internidea esperantisto, kun la akcento sur „esper”, inspiriĝis de militaj okazaĵoj, kaj noveloj en kiuj li konfrontas la senkulpan homon kun la stranga krueleco de la homfrato, sendube estas impresaj. Inter ili plej ampleksaj estas „*La Flamsalamandro*” kaj la enranĉa titolnovelo „*Koko krias jam!*” La unua surprize pritraktas ian animparencecon inter salamandro kaj knabino kiuj, grave vunditaj, la unua ekmortas dum la dua kvazaŭ renaskiĝas al pli pozitiva vivo. La priskribema aŭtoro ne ŝparas precizajn detalojn sciencajn kaj legendajn pri la besteto, sed li harmonie gvidas la kuriozan „trovaĵon” al skua fino.

La emo simboligi eĉ pli trafe efikas en la alia menciita, en kiu la talenta verkisto sondas la animon de Henriko Dunant (la fondinto de la

Ruĝa Kruco), transironta same kiel Zamenhof sian Rubikonon, sed laŭ la novelisto, eble post kontrastaj sentoj en inversa ordo, t.e. „*vivi ankaŭ mi deziras, fajron sentas mi interne*” ***) Kvazaŭ „gvidmotivo” akompanas ĝin unuflanke la simbola „*koko krias jam ekmatenas jam*” el hungara kanto kaj kaj la koko el la evangelio aliflanke, en tiipa reva kaj songa sfero.

Krom tiuj elstaraj krome legindas socirilataj noveloj, i.a. La amuza kaj satira „*La Sekreto de la Banko*” kaj precipe la trasentite sarkasma „*Estis bone tiel*”, kiuj kun sava solvo montras la leĝon en manoj de senskrupulaj homoj; legindas la ĉarma „*Nila*” — „*bluokula, blondbukla knabineto, eta, gracia, plej ofte bonkonduta, kvarjara. Norda tipo, kvankam pli malalta ol la samaĝaj nordaj knabinoj. Si estas serioza, gravmiena, aŭ turture (turte?) ridanta, precize kiel la situacio postulas...*” sed sufiĉas...

La tuta verko estas flustila, foje pacience detaŭema, foje abrupte telegrafa; la lingvaĵo ne rezultas el ekzercoj sur streĉita lingva ŝnurego kaj „tamen” neniel... kompromitas la esprimforton kaj psikologian enperetron. Szilagyi ĉi-foje reviziigis sian verkon de la literatura komitato de „S.a.t.” Estus pristudinda iam la rolo de tiaj komitatoj, gazetredaktoroj kaj recenzistoj en la evoluo aŭ neevoluo de la lingvo... en la respektinda nomo de nia kongresa kaj somerkursa popolo internacia...

Tyneverum.

*) aludas la sugestian sed unuavide nur malbonaŭguran kovrilon.

**) Vd. „*Dekdu Poetoj*” (1934)

***) Vd. „*Mia Penso*” de Z.

ESPERANTO, LA LANGUE „PASSE-PARTOUT” POUR TOUS, Manuel d’Initiation par Bernard Thaillet, Edi-

KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ

Reaperis grava libro:	gld.	fr.
<i>Fundamenta Krestamatio</i> de L. L. Zamenhof		
Klare presita, tuttole bindita	10.75	135.—
Peer Gynt. La fama verko de Ibsen en modela traduko. Kun komentario pri la ekesto de la verko kaj tri norvegaj popolfabeloj.	8.—	90.—
Leteroj de Zamenhof (G. Waringhien)		
Volumoj 1 kaj II, po volumo	8.50	130.—
La Sankta Biblio	5.90	70.—
La Internacia Lingvo (I. Lapenna)		
Faktoj pri Esperanto	5.75	70.—

Mendu ĉe:

Libro-Servo LEEN, Pythagorasstraat 122, Amsterdam
Flandra Esperanto Instituto, Blankenbergse Steenweg 72, Brugge
Belga Esperanto-Instituto, Oostenstr. 26, Antwerpen

tions Nova, Mulhouse. Prezo 100 francaj frankoj.

Ĉi-tiu lernolibro estas destinita por disvastigi Esperanton en pli vastaj rondoj, ĉar ĝi estos vendata grandskale en pluraj miloj da libroj. Ni ja devas koncedi, ke la Esperantista literaturo ne estas videbla en ĝeneralaj libroj, en kioskoj surstrate aŭ en la stacidomoj. Ĉi tiu lernolibro dank’ al la eldonanto estos vendata en tiu stilo. Pro tio ĝi estas ne multekosta kaj ne granda, ĉar ĝi devas altiri kaj ne fortimigi la aĉetontojn. Ĝi ne enhavas la kompletan gramatikon, por tiu estas rezervita dua libro „*Manuel d’Etude*” kaj tria „*Manuel de Perfectionnement*, ambaŭ de Jean Couteaux. Krome estas planita Koresponda kaj Konversacia libroj legolibroj kaj vortaro, ĉiuj en la sama serio.

La aŭtoro klopodis prezenti la lingvan materialon tiamaniere, ke la memlernantoj trovu en la libro tion, kion ili bezonas, li tial donas ekzaktan priskribon de la prononco kaj vortoj transkribitaj laŭ la franca lingvo fonetike, kaj li promesas ke oni povos post kelkaj semajnoj legi, skribi kaj paroli la internacian lingvon. Ni ankoraŭ ne havis okazon por praktike elprovi la libreton, sed ĝi saĝas vere esti laŭcele farita, nur la preso estas laŭ svisa mezuro ne tute perfekta kaj la literoj uzitaj por lernolibro tro malgrandaj, sed en Francujo oni havas pri tio eble alian opinion.

La eldono de germanlingva lernilo en la sama stilo estus malgraŭ la jam ekzistantaj bonaj gramatikoj tre utila, ĉar antaŭ ĉio la maniero de disvastigado meritas plenan atenton; ni pekas en tio, ke niaj libroj estas haveblaj nur en niaj cirkloj, kaj iu meza privatulo, kiu ne havas rektan kontakton kun esperantistoj nur malfacile povas trafi esperantajn lernolibrojn ne trovante ilin en sia kutima librejo aŭ kiosko.

A. B.

Senpaga Koresponda Servo

Kun la celo helpi al la esperantistaro, mi decidis starigi senpagan mondiskalan Korespondan Servon. Tiu Servo, al kiu mi volonte dediĉos tempon kaj monon, celos praktike interligi ĉiujn korespondemulojn en la mondo (utiligantajn Esperanton!) Sed antaŭ ol komenci, mi bezonas kolekti adresojn de korespondemaj esperantistoj en multaj landoj kaj tiucele cirkuleron mi sendas al ĉieaj Esperantogazetoj kaj organizaĵoj. Fine de la nuna jaro, kiam estos alvenintaj sufiĉe da adresoj ĉiulandaj, mi anoncos en la ĉefaj Esperantogazetoj, invitante la tutmondajn samideanojn dezirantajn korespondadi, ke ili sin turnu al mi por peti eksterlandajn korespondantojn, sendante nur unu internacian respondakuponon por pagi la aŭfrankon de mia respondo.

Korespondemuloj sendu al mi sian adreson, sed ne enmetu respondakuponon, nek atendu respondon de mi.

tiujn ĉi unue ricevitajn adresojn mi baldaŭ sendos al petantoj, kaj de tiuj petintoj ili ricevos rekte leterojn. Kursestroj povas sendi adresojn de siaj lernantoj baldaŭ finontaj la kursion. Kune kun nomo kaj preciza, legeble skribita adreso, oni nepre indiku: sekson - aĝon - kaj K (komen-canto) aŭ P (progresinto).

Oni povas uzi simplan poŝtkarton kaj grupigi plurajn adresojn sur la sama poŝtaĵo.

Konigu tiun Servon kaj ne forgesu menci, ke ĝi estas absolute senpaga. Se per havigo de korespondantoj al vialandaj samideanoj, mi helpos la Movadon en via lando, same kiel en aliaj, mi ĝojos ĉar mia celo estos atingita! Bonvolu sendigi al mi multajn adresojn el via lando kaj mi faros mian eblon por kontentigi ĉiujn.

Daniel LUEZ - Boulevard Brossolette - LAON (Aisno) Francujo.



En Antverpeno okazis tutmonda ŝaktorniro por junuloj. Ĝin partoprenis nia hispana samideano Farré (dekstre antaŭe). La juna esperantisto akiris la trian premion. Korajn gratulojn!

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris post n-roj 191/192: f-ino M. Van Mullem el Blankenberge por V.E.B.

SOLVOJ

193. reguo/gerilo; tabulo/butano; komato/tomato; kulaso/sekalo; spiono/sirolo; eskalo/kapelo; kulako/kukolo; femalo/kamelo; latino/altano; siesto/sitelo; kameno/monako; satano/sankta; virino/ravino; lameno/emajlo; humida/humila; veluro/livreo; gulaŝo/ŝalupo; tulipo/piloto; oceano/cejano; stablo/plasto; argano/angoro; serena/severa; bireto/raboti; kuloto/skolto; lilako/limako; averti/veturi; romano/molaro; agres/ares-ti; salono/solena; vanelol/novelo; satiro/taksio; melono/lameno; rimeno/mizero; konuso/onisko.

Inter pokalo kaj lipoj povas multe okazi.

194. Hor.: klera; pseŭd; estim; nimfo; kodak; metempsikoz; asist; ignor; ren; viski; kobaj; sku; kadet; boben.

Vert.: kan; alvok; ileks; insid; refleks; aso; trist; apr; pik; inkub; smoking; nabab; aboco; duk; rajon.

T.W.A. uzas Esperanton:

La komerca direktoro de TWA en Svislando, S-ro H.G.A. Meili, sendis al ĉiuj svisaj Esperantistoj cirkuleron en Esperanta lingvo. T.W.A. (= Trans World Airlines, Trans-Monda Aerlinio) estas la plej grava aervetura kompanio de Usono. Ĉiutage 52 kvarmotoraj „TWA Constellations” transflugas la nordamerikan kontinenton, kaj ĉiusemajne la maŝinoj de la TWA flugas 96-foje trans la Atlantikon.

195. ANTAŬMETU

du literojn al ĉiu el la sekvantaj vortoj por formi novajn, nekunmetitajn kaj sensufiksajn. La duaj literoj, legataj en la sama sinsekvo, montras proverbon. arta; akso; besto; opio; terni; poro; azio; loti; timi; esti; velo; enuo; sperto; kubo; bano; peranto; ero; kvadrato; kadro; atuto; cento.

196. KRUCVORTENIGMO

Horizontale. 1. sorĉe ravi(R). 2. larĝa strato. 3. nia propra lando(R). 4. perforte forpreni(R); en ĝi oni preparas medikamentojn(R). 5. daŭre. 6. trudanta respekton kaj admiron(R); parto de la spira aparato(R). 7. interjekcio. 8. ŝanĝi(R); kunligi per ŝnureto. 9. leda strio por ligi. 10. parto de la Brita Regno(R). 11. Peza veturilo por niveli grundon(R).

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										
11										

Vertikale. 1. prefikso. 2. maldolĉa(R); trista(R). 3. maŝinskribi(R). 4. ĝi estas en la kapo(R); publikaj, neprecizaj di-roj(R). 5. membro(R). 6. nimfo de riveroj(R); acideta bero(R). 7. senkonsidere amuzi sin per ŝercaj aŭ paroloj. 8. rajto de ŝtatestro forjeti decidon de asembleo(R); oni uzas ĝin por rigidigi la tolaĵon(R). 9. foso por protekti sin sur batalejo(R). 10. parto de vagono (R); objekto kiu servas por ŝirmi alian objekton, parte enigitan en ĝi. 11. rompiĝi pro interna tro forta prempovo(R).

Solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro G. J. Teunissen, Burg, Telleghenstr. 21 hs., Amsterdam-Z., la membroj de F.I.L.E. aŭ R.B.L.E. al S-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, antaŭ la 20/IX/1955.

Niaj diplomitaj Profesoroj

(Sekvo kaj fino)

5-a Ekzameno: Gento: 4/12/10

F-ino Anna Boedt (Brugo)
F-ino Yvonne Thooris (Brugo)
S-ro Albert Maertens (Gento)
S-ro Henri Petiau (Gento)
S-ro Michel Sebruyas (St. Amandsbjg.)
S-ro Jules Barne de Kneef (Gentbr.)

6-a Ekzameno: Gento: 5 k. 12/5/12

F-ino Irène Baudon (Gento)
F-inon Eugénie Colijn (Gento)
F-ino Hélène Hübisch (Gento)
F-ino Juliette Nachtergaele (Gento)
F-ino Renée Servranckx (Gento)
F-ino G. Sprangers (Gento)
F-ino Eleonore Van Melle (Gento)
F-ino Mary Willems (Gento)
S-ro Jules Clerbaut (Boom)
SS-ro O. Herman (Gento)
S-ro Auguste Van Aecker (Lembeek)
S-ro Florent Van Cleemput (Gento)
S-ro Felix Van Eecke (Gento)
S-ro Amatus Van der Syt (Gentbr.)
S-ro G. Van de Vyvere (St. Amandsbjg.)
S-ro J. Van de Winckel (Gento)

7-a Ekzameno: Gento: 3/5/14

S-ro Gustave Vermandere (Gento) *)
S-ro L. Varendonck (Gento)
S-ro P. Mast (Gento)
S-ro J. Leflot (Liero)
S-ro A. Buyck (Gento)
S-ro E. Snissaert (Gento)
S-ro O. De Bruijcker (Gento)

8-a Ekzameno: Gento: 14/11/20

S-ro Léon Cogen (Gento)
S-ro Clotaire Vandevelde (Gento)
S-ro De Bosschere (St. Niklaas)
S-ro Wever (Gento)
S-ro Somerling (Gento)
F-ino De Moor (Gento)
S-ro Hendrickx (Gento)
S-ro Groverman (Gento)
F-ino Doutreligne (Gento)
F-ino De Rycke (Gento)
F-ino Terry (Gento)
F-ino Soete (Gento)
F-ino Colyn (Gento)
S-ro Van Hove (Gento)

9-a Ekzameno: Antverpeno kaj Bruselo:
14 kaj 21/5/22

S-ro Charles Beaujean (Antverpeno)
S-ro Robert Broeckhove (Antverpeno)
S-ro Raoul Clemens (Antverpeno)
S-ro Victor Coene (Antverpeno)

*) S-ro Vermandere „Gento” estas la bone konata membro de „La Verda Stelo” de Antverpeno, kie tiu ĉi loĝas de preskaŭ 35 jaroj.

S-ro Morris De Ketelaere (Antverpeno)
F-ino Adrienne Hansen (Antverpeno)
S-ro Maurice Jaumotte (Antverpeno)
S-ro Juul Karnas (Antverpeno)
S-ro Hendrik Michiels (Antverpeno)
S-ro Constant Schrociens (Antverpeno)
S-ro Edward Van Beughem (Antverpeno)
F-ino Alice Van Ganse (Antverpeno)
F-ino Irène Van Oeckel (Antverpeno)
S-ro Jaak Verbeeck (Antverpeno)
S-ro Camille Verstrepen (Antverpeno)
F-ino Paula Deltombe (Bruselo)
S-ro Ed. Haine (Bruselo)
F-ino Simone Obozinski (Bruselo)
S-ro Maurice Van Aelst (Bruselo)
S-ro Henriko Van Vynckt (Bruselo)

10-a Ekzameno: Antverpeno: 21/X/28
S-ro Maurice Boeren (Antverpeno)
S-ro Willy De Schutter (Antverpeno)

Por viaj esperantaĵoj,
libroj, insignoj k. c.

Belga Esperanto-Instituto

26, Oostenstraat, 26
ANTVERPENO

*kiu ankau havigos al vi nacilingvajn
librojn, revuojn kaj gazetojn, kaj
ĉiuspecan skribmaterialon.*

S-ro Paul Kempeneers (Bruselo)
F-ino Germaine Kenens (Antverpeno)
S-ro L. Van Praag (Antverpeno)

11-a Ekzameno: Brugo: 8/6/35

S-ro Hector Boffejon (Antverpeno)
S-ro Henri Sieiens (Antverpeno)
S-ro Jules Alofs (Bruselo)

LISTO LE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Antverpeno

„In 't Duiveken” (S-ano Paesmans), Lge Koepoortstr. 64: Kostumoj
(5 0/0 rabato al Esp.)
Vino Max Bolsius, Diepestraat 58-60, Antverpeno: Kuirejlaro. Tel. 32.57.85
M. Phillips, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10% por la membroj.
P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg.
Suoj — Teksaĵoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86
J. Montmirail, Kortemarktstraat 53, Berchem. Arhitekto. Tel. 39.58.66
Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Hemiaĵoj. Tel. 39.17.09
Henny de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Privataj lecionoj
Roger Jaumotte, Cyriel Buyssestr. 44, Antv. Anoncoj en tagjurnaloj. Tel. 37.47.14
K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
R. Vanistendael, Dambruggestraat 234, Antverpeno. Okulvitroj — Rab. 5 0/0
CL. Peeters, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67
L. Van Reybrouck, Venusstraat 33, Antverpeno: ĉiŝp. iloj por la hejmo. Tel. 32.43.88
Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken.
Vitraĵoj — Speguloj — Tel. 37.88.20
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Aŭtoĉar-eksplado. Tel. 39.20.59
H. Peeters, Vordensteistr. 58, Schoten. Ingen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 81.48.47
H. Jacques, Lange Beeldekenstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38
Verdijck, St. Rochusstraat 174, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
P. Peelman, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
Y. Amerijckx, Helmstraat 154, Borgerhout. Peltaĵoj
M. Blajwas, Simonsstraat 40, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18

KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamoj en siaj butikoj
G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81. Frizisto por sinjorinoj
„De Boerinekens” (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo
A. Roels, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07
G. Goemaere, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktejo
Vandersmissen, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Papaĵoj, parfumaĵoj
Van Kerckhoven, Grote steenweg 63, Berchem. Fornoj; forĝaĵoj
R. Scheerdijk, Oude Vaartplaats 34, Antverpeno. Ŝnuroj; lignaj ŝuoj; lanternoj
gardenilaro

Butiko Angora, (galerio), Huidevettersstr. Antverpeno. Luksaj pantofloj, sportŝuoj
Librejo Schuttershof, Schuttershofstr. 36, Antv.: luo, aĉeto, vendo de libroj
Vojaĝ-agentejo Pier Busseti, Hopland 5, Antv.: privataj kaj grupvojaĝoj

Bruselo

Farmaciisto Jacobs, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 15.26.01
Farmaciisto N. Nells, Meise 59.13.73
„BONBONS SWINNE”, 77, rue de Nieuwenhove 44.57.36
Imprimerie Lelens, 18, rue de la Princesse 21.10.98
CARRELAGE „Carrart”, 19, avenue de Saxe 21.74.49
Viajn MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57 15.96.97
Libroj, Publikadoj, ĵurnaloj, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck 11.71.03
Tinkturejo, senmakuligejo „DEX” 16, rue Esnest Laude 15.28.29